WIKIPEDIA

Kabarda lingvo

La **kabarda lingvo** (адыгэбзэ, *adəgăbzə̆*), foje ankaŭ nomata **kabarda-ĉerkesa lingvo**, estas lingvo aŭ kontinua dialektaro el la abĥaz-adigea lingvaro kaj de ties subgrupo cirkasaj lingvoj, parolata en la regionoj Kabardio-Balkario kaj Karaĉajio-Ĉerkesio de Rusio, kaj aldone en nordorienta Turkio. La lingvon uzas proksimume 1,5 milionoj da homoj, sed la nombro de parolantoj konstante malkreskas. Unesko tial konsideras la kabardan vundebla lingvo.[1]

La lingvo havas 48 konsonantajn fonemojn[2], el kiuj 23 estas frikativaj. Kelkaj lingvistoj konsideras la kabardinan kaj adigean lingvojn nuraj dialektoj de la adigea lingvo. La adigeoj, kabardoj kaj ĉerkesoj nomas sian lingvon *adigebze*, kio signifas *adigea lingvo*. Tamen en la rusa oni distingas inter la kabarda kaj ĉerkesa lingvoj.

Ĝis 1924 la kabarda skribsistemo funkciis surbaze de la araba kaj cirila alfabetoj, en 1924-1936 — surbaze de la latina alfabeto, ekde 1936 baziĝas sur la cirila alfabeto.

Ekzistas vikipedio en la kabarda lingvo, kiu komence de februaro 2012 havis iom pli ol 1900 artikoloj.

kabarda	
адыгэбзэ adəgăbzə̆	
Parolata en	regionoj Kabardio-Balkario kaj Karaĉajio-Ĉerkesio de Rusio, nordorienta Turkio
Parolantoj	1 600 000
Denaskaj parolantoj	ĉ. 1,5 milionoj
Skribo	Cirila alfabeto
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	kbd
ISO 639-3	kbd
SIL	KBD (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=kbd)
Glottolog	kaba1278
Angla nomo	Kabardian
Franca nomo	kabarde
Vikipedio	

Alfabeto

А а	Э э	Б б	В в	Г г	Гу гу	Гъ гъ	Гъу гъу
Д д	Дж дж	Дз дз	Е е	Ё ё	Ж ж	Жь жь	З з
И и	Й й	К к	Ку ку	КI кI	КIу кIу	Къ къ	Къу къу
Кхъ кхъ	Кхъу кхъу	Л л	Лъ лъ	ЛI лI	М м	Н н	О о
П п	ПI пI	Р р	С с	Т т	ТI тI	У у	Ф ф
ФI фI	Х х	Ху ху	Хь хь	Хъ хъ	Хъу хъу	Ц ц	ЦI цI
Ч ч	Ш ш	Щ щ		Ъ ъ	Ы ы	Ь ь	Ю ю

			щI
			щI
Я я	I	Iу	

Notoj

1. ↑ interaktiva mapo de UNESKO pri la mondaj danĝeriĝintaj lingvoj (angle, (http://www.unesco.org/culture/languages-atlas/en/atlasmap/language-id-376.html) france (http://www.unesco.org/culture/languages-atlas/fr/atlasmap/language-id-376.html) kaj hispane) (http://www.unesco.org/culture/languages-atlas/es/atlasmap/language-id-376.html) angle
2. ↑ Ethnology, т. 5 стр. 31 — 1966, University of Pittsburgh (http://books.google.ru/books?id=X98sAAAAMAAJ&q=kabardian+language+has+48+consonants&dq=kabardian+language+has+48+consonants&ei=6fcOS8m5JqCeygTTtŭoDA)

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kabarda_lingvo&oldid=6263639"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:39, 28 jan. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.